

ĈEĤOSLOVAKA ESPERANTO-REVUO

LA PROGRESO

OFICIALA ORGANO
DE ĈEĤOSLOVAKA ASOCIO
ESPERANTISTA

XIII. JARKOLEKTO 1931.

RESPONDA REDAKTORO: RUD. HROMADA (PRAHA)
REDAKTOROJ: H. K. BOUŠKA (PRAHA), O. GINZ (PRAHA), Dr. STAN. KAMARYT
(BRATISLAVA)

REDAKCI-O KAJ ADMINISTRACIO:
PRAHA VII.
SOCHAŘSKÁ 333

PRESIS JAN MINÁŘ NYMBURK

TABELO DE ENHAVO

LITERATURO

Signo * montras poemon.

Originala:

| | |
|---|----|
| H. K. Bouška: Super unu filmo | 6 |
| Dr. K. Kalocsay: Rimportreto de Miloš Lukáš | 78 |
| Ďr. Stan. Schulhof: Kanto de P'sklavo | 54 |

Tradukita:

| | |
|--|-----|
| Hašek Jar.: Pri la bela sinjorino kaj urso en la valo Začaljanka. (Trad. H. K. B.) | 2 |
| Jirásek Alois: Filozofoj. (Trad. Jiří Svoboda) | 100 |
| Machar J. S.: *Klasika belulino. (Trad. Miloš Lukáš.) | 99 |
| Vrchlický Jaroslav: *Eklogo. (Trad. Rud. Hromada) | 3 |
| Vrchlický Jaroslav: *Balado pri monto Blaník. (Trad. Rud. Hromada) | 26 |
| Welzl Jan: Tridek jaroj en la ora nordo. (Trad. T. Mrázková kaj Bř. Pittner) | 42 |
| Rusa kanto: Krizantemoj. (Trad. Dr. Jos. Fousek) | 66 |
| Kaspar Hauser: Mallonga skizo de la nacia ekonomio. (Tr. R. H.) | 78 |
| Kelkaj penseroj el Nový Lid (Trad. Božena Vlčková) | 101 |
| B. Koutník: Viro kaj virino en la kulturo. (Tr. R. H.) | 54 |
| M. Pujmanová: La patrinoj kaj la senarmigo. (Tr. R. H.) | 90 |

Pri la literaturo kaj libroj:

| | |
|--|--------|
| Dr. Parma Čestmír: Evoluo de la esperanta kaj novĉeĥa literaturoj. | 27, 43 |
| Merchant John (Sheffield): Pri la traduko de la libro de Jan Welzl: Tridek jaroj en la ora nordo | 39 |
| Bšk: Hašek | 6 |

POPULARSCIENCAJ TEKSTOJ

| | |
|--|----|
| L. Červenka: Geometriaj eksperimentoj. (Tr. R. H.) | 19 |
| Dr. Stan. Kamaryt: Testado en esperanto-kursoj. | 77 |
| R. H. La ŝtoniĝintaj restoj de maraj animaloj 8. — Leciono de geometrio 19. — La homaro vivas unu minuton 67. — Imago pri la eterneco 67. — Literaturo lingvo por nomadoj 67. — Trovo de granda saŭro en Slovakio 80. — Imagoj de alĥemiistoj (Dr. Al. Sommer-Batěk) 91. — El kio estas la interno de la terglobo? 102. — Kial ni ĉesas kreski. 102. | |
| Kariofilo: Birdoj trampistoj. | 55 |

ESPERANTISTA MOVADO

Tutmonda:

| | |
|--|---------------------|
| La registaro de Liechtenstein dankas en esperanto al Ĉeĥosl. Asocio Esperantista | 25 |
| Vojaĝo de J. R. Scherer en Ĉeĥoslovakio. | 60, 62, 68, 93, 110 |
| Dankesprimoj de J. R. Scherer al la ĉsl. gesamideanoj | 97 |
| Dr. Stan. Kamaryt: Kredo je la intelekto. | 1 |
| Dr. Stan. Kamaryt: Krakova kongreso. | 65 |
| Otto Ginz: Nenio nova sub la suno en Esperantujo. | 101 |

Dana filmo en Ĉeĥoslovakio 12. — Danko de Danoj 35. — Financoj 49. — Skolta tendaro esp. 15, 61. — Gramofona disko de Bakule kun „La Espero“ 36, 61. — Gramofona disko kun voĉo de Zamenhof 61. — I. C. K. 62. — Kongreso en Paris 85, 95. — Zamenhof-monumento en Bialystok 92. — Esperantista Hejmo en Aspremont 105. — Int. Scienca Asocio 103. — Kongreso en Krakov 103. — Oficiala Jarlibro de UEA por 1931 (S. K.) 105

EL ESPERANTO-MONDO 18, 85, 92, 103.

Ĉeĥoslovaka:

| | | |
|---------------|--|--|
| Pri Ĉ. A. E.: | Bultenoj noj: 34—41 . . . 9-16, 29-37, 45-50, 57-60, 69-76, 81-44, 94-96, 107-111 | |
| | Komitataj kunvenoj | 9, 10, 34, 48, 57, 58, 69, 82, 94, 107 |
| | 12. ĝenerala kunveno | 45 |
| | Agado de ĈAE en 1930 | 29—33 |
| | Financa raporto de ĈAE pri 1930 | 33 |
| | Gvidantaro de ĈAE en 1931 | 47 |
| | Studenta Sekcio | 48, 60 |
| | Esperanto ve školách pro měšťanské školy (Julie Supichová) | 20 |
| | O zkouškách speciálních (Julie Supichová) | 20 |
| | Za profesorem Zubatým (O. Ginz) | 50 |
| | Profesor J. Velenovský a esperanto (Dr. St. Kamaryt) | 37 |
| | Internacia Libertempejo en Bělohrad | 17, 93, 96 |
| | Esperanto permesita por mallongonda radio (O. G.) | 86 |
| | Z ESPERANTSKÉHO SVĚTA (O. Ginz) | 16, 36, 41, 76, 84, 89 |
| | MOVADO EN ĈEĤOSLOVAKIO (diversaj kunlaborantoj) | 15, 50, 73, 95, 108 |
| | ĈEĤOSLOVAKA GAZETARO KAJ ESPERANTO (O. Ginz) | 49, 59, 71, 84, 96, 112 |
| | UEA-PAĜO (Otto Sklenčka) | 17, 56 |
| | Esperanta Sekcio ĉe Ústř. spolek ĉsl. profesorů (S. K.) | 50 |
| | Mia vojaĝo tra Granda Britlando (Kl. Urban) | 18 |
| | Nechuť k novotám (Rudolf Friedrich) | 40 |
| | Kie kunvenas esperantistoj de ĈSR | 13 |
| | Diversaj informoj 21, 52. — Por filatelistoj 24. — Al la legantoj 24. — Legorondoj 38. — Libera tribuno 38. — Redakcia 52, 62, 93, 112. — Respondoj 86. — Laboroj de ĉsl. esperantistoj 106. | |

LINGVA FAKO:

| | | |
|---------------|--|----------------------------|
| Bouška H. K.: | Eĉism českých esperantistů | 22 |
| | -Ul, -ant, -ist | 23 |
| Hromada Rud.: | Texty a jich překlady s poznámkami | 23, 51, 63, 87, 105 |
| | Něco pro samouky a kursy | 88, 106 |
| | Por kursanoj | 8, 28, 55, 67, 80, 91, 102 |

ĈEĤOSLOVAKA

ESPERANTO

REVUO

LA PROGRESO



OFICIALA ORGANO DE ĈEĤOSLOVAKA ASOCIO ESPERANTISTA
 REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: PRAHA-VII. SOCHAŘSKÁ 333.

Jarabono (10 numeroj) Kĉ 20.—; fremdlando Kĉ 25.— (aŭ 4 sv. fr.) Escepto: Aŭstrio, Jugoslavio, Pol-
 lando kaj landoj de Stockholma interkonsento: 3 sv. fr. Konto de Poŝta Sparkaso Praha: N-ro 34.271.

KREDO JE LA INTELEKTO.

Konvinko, ke logika, tio estas ĝusta rezonado estas la plej efika kaj la plej utila metodo por veni al la Vero, tio signifas al kono de la efektivaj kaŭzoj aŭ rilatoj, estas la plej malnova opinio de filozofanta homo. Plato tion kredis tiom firme kiom sankta Tomaso el Aquino kaj kiom Descartes. Tiu ĉi plej konvinke el ĉiuj racionalistoj sciis klarigi, ke la ideo estas des pli reala, ju pli klare nia intelekto ĝin konas. Do ju pli ĝenerala estas ia koncepto, tio signifas ju pli ĝi estas abstrakta, des pli ĝi respondas al la realo. Tiu firma kredo al la homa intelekto ne malgrandiĝis de post la tempo de Descartes. Kvankam ĝi devis trairi mokojn kaj dubojn de skeptikuloj, mistikuloj kaj diversaŭzaj negativuloj sennomaj. Restis kaj kreskis tiu fido, ke intelekto pleje helpas al ni en ekkonado de la vero.

La unuaj jardekoj de la dudeka jarcento alportis pluan firmigon de tiu racionalisma konvinko; ili firmiĝis ĝin per grava elpenaĵo: La kriterio de la vero estas ĝia uzebleco. Ni scias, ke nia rezonado venis al ĝusta rezulto pro tio, ke la rezulto estas uzebla. Pri la uzebleco decidis sperto, en la plej konvinka okazo sperto eksperimenta.

Tiu ĉi konvinko donis novan kaj tre gravan apogon al la kredo je la homa intelekto. Ĝi apogiĝis opiniojn de ĉiuj, kiuj kredas, ke oni povas ankaŭ rilatojn inter la homoj aranĝi laŭ postuloj de la intelekto. Tio signifas laŭ postuloj,

kiujn la sperto trovas utilaj kaj dezirindaj. Nome la sperto ne sole pasive observata, sed ankaŭ celscie alvokata, kio signifas, eksperimente konstruata.

Oni trovis, ke ne estas ĝuste rigardi la „mi“ de la homo kvazaŭ ĝi estus ia tuto en si mem kaj ke sekve sufiĉus ŝanĝi la individuojn (en iliaj kapabloj kaj precipe en ilia moralo) kaj ke per tio jam la sociaj aranĝoj transformiĝus. La glora amerika filozofo John Dewey, montris erarigan danĝeron de tia konceptado de la aferoj. La „mi-eco“, la egoismo, la egocentrismo ne estas io daŭranta aŭ ekzistanta, sed ĝi estas dinamika procedo. Se oni tion ekvidas, oni ankaŭ ekvidas, ke la transformiĝoj de la socio estas la sola rimedo por kreo de ŝanĝitaj individuoj. Taŭgecon de la sociaj transformiĝoj oni povas ekoni sole per la sperto. La intereso pri la morala pliboniĝo de la unuopulo kaj kaj pri objektiva reformo de la ekonomiaj kondiĉoj sociaj tiamaniere identigas.

Klopodado de esperantistoj mirinde

Z OBSAHU. — EL LA ENHAVO.

Esperanto v osnovách našich měšťanských škol.
 O zkouškách z esperanta.

Překlady z Vrchlického a z Haška.

Bakulova družina zpívá esperantskou hymnu.

Valná hromada Svazu čsl. esperantistů, 19. dubna.

Ĉeĥoslovaka Antologio.

Geometriaj eksperimentoj.

Japana esperanto-filmo.

Sukceso de la esp. filmo pri Danlando.

koincidas kun tiu ĉi Deweya pensmaniero. Ni proponis provi, ĉu estas ebla artefarita helpa lingvo. La sperto montris, ke ĝi estas ebla kaj ke esperanto bonege taŭgas por tiu celo. Tiu eksperimento jam finis. Sed nun estas farata la dua eksperimento: Ĉu la uzado de esperanto fariĝos ĝenerala. Temas pri jeno: Ĉu la poveblon senpere rilati kun fremdlingvano uzos tiom da homoj, ke fariĝu neebla la nuna hontinda stato, ke iu volante rekomendi ian sian plaĉon rekomendas ĝin per aserto, ke la aranĝo de li prikantata bone funkcias ie en fremdlando, kie la simpla ĵurnalleganto ne povas ion kontroli. La ĝenerala uzado de esperanto faros finon al tiu ĉi stato ne digna por socio regata per raciaj normoj. Sed tiu stato estas ŝanĝebla sole per ĝenerala enkonduko de esperanto. Ĉu ĝi okazos? Mi ne dubas pri tio. Ĉar ĉie kaj ĉiam ni vidas, ke la socio evoluas laŭ normoj racionalismaj, tio signifas, laŭ celoj kaj metodoj, kiujn logika, sur sperto bazita, rezonado trovis rekomendindaj pro ilia uzebleco kaj el tio sekvanta utileco.

Ankoraŭ unu sperto venis el la esperantisma movado. Por nia eksperimento estis kaj estas bezonaj miloj da homoj, kiuj lernis, uzis kaj uzas nian lingvon sole por tiu eksperimenta, prova celo, bone sciante, ke ili neniam ricevos ian ajn profiton el tiu sia decido. Kaj tamen ili estas fidelaj kunlaborantoj dum dekoj da jaroj. Tiu ĉi oferemo de miloj el nuntempuloj estas tiom granda dokumento de la samtempa idealismo enestanta en koroj de la diversklara kaj diversklasaj homoj, ke estas per ĝi decide refutita plendado de la malgrandkoraj hometoj pri manko de oferemo en la nuna epoko. Poresperanta laboro ne estas ĉiam agrabla. Sed scii, ke oni kunlaboras kun tiom da homoj flamantaj plialtigi la donitan nivelon kulturan sole pro sia konvinko, ke tiu nivelo estas plialtigebla, tia scio valoras la penon esti aktiva esperantisto.

Dr. Stan. Kamaryt.

Umožněte nám včasné vycházení
včasným zasláním předplatného.

PRI BELA SINJORINO KAJ URSO EL LA VALO ZAČALJANKĀ.

Verkis Jaroslav Hašek (aprilon 1914). El la ĉeĥoslovaka lingvo tradukis H. K. B. (februaron 1931).

I.

Iun tagon okazis, ke la registaro rememoris reĝajn hungariajn arbarojn sur Magura, al kiuj ĝi kondukis ĝis nun kiel duonpatrino. Mi konjektas, ke tiam la supera administrantaro de la reĝaj bienoj estis en sentimentala humoro, kiam ĝi decidis, ke tiuj montarbaroj bezonas zorgiston. Tial oni venigis tien supren sinjoron Ďula Ragás, reĝan arbariston, kiu ĝis tiam gardis ŝtatajn arbardistriktojn en Miškovce.

Li ĵus sidis ĉe vino en la kazino kaj amuzis la tutan societeton rakontante sian plej novan aventuron travivitan kun ciganoj trans la rivereto. Ili profetis el lia mano, ke li foriros por neniam reveni plu. Li rakontis, ke tiun ĉi profetaĵon li pagis al maljuna cigano per malnova duonguldeno. Sole preterpase li aludis, ke poste akompanis lin unu juna cigano kaj tiame temis pri neniu profeto el la mano.

Certe li estus plu priskribinta la belon de la nigrookula junulino, se ne estus veninta por li arbargardisto, ke alveturis la supera inspektisto de la administrantaro de ŝtataj bienoj kaj ke li atendas lin en la arbaristejo.

Tiel sinjoro Ďula Ragás sciigis el la buŝo de la inspektisto mem de ŝtataj bienoj, ke oni kompatis la forlasitajn arbarojn en Magura kaj ke li estas nomita reĝa supera arbaristo tie supre en Začaljanská dolina.

Li demandis lin ankaŭ, ĉu sufiĉas al li du monatoj por ĉion ordigi ĉi tie kaj edziĝi.

„Kiel, mi petas?“ demandis timiĝite sinjoro Ragás, „Sciu“, patravoĉe diris la inspektisto, „mi neniel intencas vin konsoli. Mi esperas, ke vi estas sufiĉe kuraĝa por bone sen ĉiaj iluzioj pripensi vian situon.“ Li parolis tre afable pri tio, kiel ekzistas neniu espero, ke li iam revenus de tiuj montoj. Krom tio oni devas konscii, ke en tiu prarbaro oni trovos nenian vivantan vi-

rinan animon. Kiu tien venas, tiu estas fortranĉita de la mondo. La ŝtata administrantaro tie adaptos al li belan oportunan loĝejon en unu forlasita hajduka kabano, disponigos por li du arbargardistojn kaj la valo Zaĉaljanka denove reviviĝos. En la somero li povas bredi ŝafojn kaj mendi librojn. En vintro ĉio estas superŝutita de neĝo, oni vivas el provizoj. „En la kameno krakas la fajro,” poete li diris, „kaj tiam mi rekomendas al vi havi sur genuoj junan edzineton.“

„Bone,” konsternite diris sinjoro Raĝás, „sed kiun mi devas edzinpreni?”

„Bedaŭrinde, koncerne tion mi ne povas konsili al vi, tio estas afero pure privata. Prenu kiel edzinon kiun vi volas, sed ŝi devas esti ia kuraĝa virino, ĉar oni ne povas ekskludi, ke ne venos kun malnovaj pafiloj kontraŭ vin rabistaj hajdamakoj. En Karpatoj ili pafmortigis jam tri niajn reĝajn arbaristojn. „Kompreneble,” aldonis la konsolanto, „tio ne bezonas reokazi en Maĝura. Maĝura ne estas Karpatoj. Vere, mi ne konas tiean popolon, sed oni ne devas tuj pensi pri ĝi la plejmalbonon. Vi estas tre kapabla homo, kaj vi tute bone taŭgas por tiu sovaĝulejo. Imagu, ke tie ekzistas lupoj, sovaĝaj katoj, linkoj, nigraj aproj kaj ursoj. Ni scias, ke vi nenion timas. Vi bezonas nenion fari, sole zorgi tiujn montarbarojn kaj tio estas bela afero.“

„Imagu,” diris sinjoro Raĝás, „ke oni vin translokigus tien, kion vi farus?”

La inspektisto embarase diris, ke li estas maljuna homo kaj li ne taŭgas por tiaj aferoj.

„Mi kredas,” li diris ekscitite, „ke mi pafmortigus min. Sed vi estas juna homo, kies estonteco estas en tiuj montarbaroj. Mi iros al la ministro de la internaj aferoj, kaj ni nomos vin direktoro de tiuj arbaroj. Ni plipagos al vi 5000 guldenojn. Vi devas esti konvinkita, ke tio estas idilio. Vi bele edziĝu kaj precipe vi lernigu viajn gardistojn ludi ŝakon. Kiam en vintro tri monatojn oni ne povas eliri eksteren pro blankaj neĝaj baraĵoj, estas tempo de granda enuo. Vi ankaŭ povas havigi al vi piron. Vi povas esti ĉiutage ebria, sed, ĉefe ŝakon kaj edzinon. Kunprenu ankaŭ

EKLOGO V.

1889.

JAROSLAV VRCHLICKÝ.

*La padus' odoras en aer' kristala,
sub piedo via tremas muska bed',
de la lago sonas tono bakĥanala,
de kratagoj falas brila flora ret':
miras vi kun ĝoja larm'
kial tia ĉarm'?*

Svarm'

*diras birda supre, flora ĉe la ter':
Ne alia de l' printempo estas manier'!*

*Via spir' padusa, brila la okulo,
dum sub mia mano tremas via brust'.
Fontas miaj kantoj el la korangulo
kiel riverfonto el rokara krust';
miras vi kun ĝoja larm'
kial tia ĉarm'?*

Svarm'

*diras birda supre, flora ĉe la ter':
Ne alia de la amo estas manier'!*

Trad. RUD. HROMADA.

(Represita el Literatura Mondo.)

ludkartojn kaj post du monatoj vi estu en Zaĉaljanská dolina.

Tiun tagon lia arbargardisto estis en suferplena situo. Sinjoro Raĝás kriis, ke li ĉion pafmortigos, lin, sin, la tutan Miŝkovce. Poste li forkuris kazonon, kie oni sidis ĉe boteloj de la vino „he-d'aljský samotok“ ĝis la kvara nokte. Post la kvara la sinjoroj el la kazino are venis antaŭ la urbodomon de Miŝkovce kaj ĉiuvoĉe ili kriis: „Donu edzinon al sinjoro Raĝás!”

La notario fortrenis sinjoron Raĝás hejmen kaj ĉirkaŭbrakante lin sur la koridoro li sentimentale diris: „Frato Ďula, sciu, mi donos al vi mian kuzinon Zoŝka. Tiu junulino neniun timas. Iam en Ráb ŝi eltiris el la rivero dro-nantan pioniron. Vi eĉ ne kredus, ke ŝi estas tiel sentima. Ŝi havas blujajn okulojn, sciu, tiajn komikajn, kaj tio estas gajaĵo.“

Li komencis ridi kaj ankoraŭ sur la lito li ridis kaj diris: „Frato Ďula, ŝi havas tiajn komikajn blujajn okulojn, tio estas gajaĵo kaj en Ráb ŝi eltiris pio-

niron, tio estas gajaĵo. Kaj bela ŝi estas. Tio estas, bofrato, gajaĵo."

Kiam la alian tagon poste en Rimavská Sobota, kien ili alveturis, sinjoro Ragás vidis tiujn blujajn komikajn okulojn de fraŭlino Zoška, li ekamis ilin.

Unu semajnon poste li iris kun ŝi tra aleo de salikoj apud rivero Rimava kaj komencis paroli pri tio, ke li neniam en la vivo vidis tiel altan, belan maizon kiel nunjare. Poste li parolis ion pri piroj, morusoj kaj finis per radikalaj vortoj: „Permesu, fraŭlino Zoška, ĉu ne estus eble iel fari, ke rakonti pri si veran Odiseadon.

„Atendu, mi tion pripensos.“ Ili ĉirkaŭiris la tutan Rimavská Sobota kaj kiam ili tiel silente promenis pli ol unu horon, fraŭlino Zoška haltis kaj diris: „Mi opinias, ke tio estus ebla.“

„Mi ĝojas," ekkriis sinjoro Ragás, kaj post du monatoj en Začaljanská dolina ŝi sidis sur liaj genuoj apud la kameno precize laŭ intencoj de sinjoro inspektisto el la administrantaro de reĝaj bienoj.

Post kvarono da jaro sinjorino Zoška komencis eniĝi kaj rememoris helajn, klarajn ebenaĵojn apud Rimava brilumitajn de ardanta suno orumanta grenojn de maizo.

II.

Začaljanská dolina ne estis tute senhoma kaj senviva. Sur ĝia alia fino fumumis ŝafan fromaĝon super fajrujo Ondřej Taraščuk, dum kiam antaŭ lia traba kabano malvigle ruliĝis granda nigra malsovaĝigita urso Míša. Míša ne devenis de tie el Magura kaj ĝi povus rakonti pri si veran Odiseadon.

Ĝi naskiĝis sub Popadije en Arbaraj Karpatoj, en tiuj grandaj, sovaĝaj kaj ĉarmaj arbaroj, kie dum la nokto estas aŭdeblaj misteraj hu-sonoj kaj kie ne ekzistas ŝoseoj nek vojoj. Unu tagon ĝia patrino eliris kun ĝi promeni kaj renkontis unu el tiuj sovaĝaj filoj de Arbaraj Karpatoj. Ursido estis tiam okmonata kaj ĝi estis jam bela junbesto. La sekvo de tiu renkonto estis, ke la ursido fariĝis orfo, ĉar tiu viro mortigis ursinon per ĉastranĉilo.

Ĝi sukcesis forkuri kaj travivis poste malbonan vintron en la plej norda par-

to de Arbaraj Karpatoj. Ĝi trovis bona foriri iom pli malproksimen kun la espero, ke en aliaj arbaroj estos pli bone.

Ĝi trakuris distriktojn Spiš, Turňa kaj Abauj, trapenetris arbarojn de Gemer, travagis eĉ Tatrojn kaj transiris al Magura.

Unu tagon ĝi derampis de sur la montoj en la valon Začaljanka kaj nokte ĝi sieĝis baritan ŝafejon kaj kabanon de Taraščuk kun neklara espero, ke ĝi havigos al si liajn ŝafojn. Ĝi ekdormis pro malforto en terura frosto kaj tiel trovis ĝin rigidan Ondřej Taraščuk.

Li forportis ĝin en la ĉambron al fajrujo kaj eliris eksteren por akriĝi sur ŝtono sian tranĉilon, intencante senfeliĝi la ursideton. Kia estis lia surprizo, kiam li revenis kaj la nigra granda harbulo subite komencis streĉi sian korpon. Poste ĝi leviĝis kaj luliris ĉirkaŭ la fajro kaj amike murmuris. Kiam ĝi ĉion ĉirkaŭflaris, ĝi sidiĝis apud surprizita Ondřej kaj ridinde lin rigardis.

Ondřej Taraščuk ekridis super la tiel komika gasto kaj ĵetis al ĝi unu platkukon el branoj kaj batetis la dorson de la gasto.

La ursideto manĝis la kukon, manĝis alian kaj tute kiel hejme ĝi komencis ĉe la fajrujo ordigi sian pelton. Poste ĝi kuŝiĝis al la piedoj de Ondřej kaj endormis kiel la plej justa kreito en la plej granda sendanĝero.

Kaj Ondřej Taraščuk ridis, ke tio estis aŭdebla ĝis en Začaljanská dolina.

De tiu tempo tiuj du estis amikoj. Ĝi komprenis, ke li en pli longa prediko proponas al ĝi, ke ĝi dece konduku kaj evitu ĉion, kio povus malbonigi iliajn amikajn interrilatojn.

Taraščuk havis ankaŭ neklaran konscion, ke li estas kristano, almenaŭ tion diris al li lia patro, kiun li entombigis sur unu monteto kaj sur lian tombon li penege dum somero kolektis tumulon.

Do unu tagon, kiam la neĝoj degelis, li prenis ursideton kaj forportis ĝin al rivereto Začaljanka, kie li ĝin baptis preĝante: „Plej glora ĉiopotenca Dio! Mi petas vin preni al via konscio, ke tiu ĉi bestido estas nomata Míša kaj mi petas vin, ke ĝi prosperu por via kaj mia kontentoj.“

Efektive Miŝa bone prosperis. Ĝi postiris lin kvazaŭ hundo, ĝi libere vagis en la ĉirkaŭaĵo kaj kaŭzis al li neniujn zorgojn. Ĝia nutraĵo estis ekskluzive planta krom iam iu sovaĝa kuniklo.

Ĉiumatene ĝi faris sian tualeton, kaj poste ĝi iris kun sia amiko rigardi ŝafojn en la barejo. Kun tiuj ĉi ĝi vivis en amikaj rilatoj. De tempo al tempo ĝi luktis kun Ondřej kaj tiel ili ambaŭ vivis en la arbaro la plej belajn momentojn. Ĝi iris kun li ankaŭ ĉasi kaj tiel okazis, ke en la arbaro sub Zubrina ili renkontis unu arbargardiston de sinjoro Ragás, Vazila, Slovakon el Spiš.

Tiun tagon Vazila alkuris la kabanon de sinjoro Ĝula Ragás kaj enfalis la ĉambron, kie ĉe piano kantis sinjorino Zoŝka unu el siaj malĝojaj romancoj el la tempo de la reĝo Mateo. La supera reĝa arbaristo faris rondiron al rivero Poprad kaj la juna sinjorino estis sola kun siaj neklaraj deziroj kaj sopiroj en tiu senhomejo. Imagu, ke ŝi jam kvinfoje oscedis.

„Grandpotenca sinjorino,” vokis terurplene Vazila, „urso kaj viro.”

Poste li fortigis sin per gluto da brando el pendbotelo kaj komencis paroli pri sia stranga renkonto.

Sinjorino Zoŝka stariĝis kaj diris sole: „Venu montri al mi, kie ili estas.”

Kaj tiun tagon Ondřej Taraščuk unuan fojon en sia vivo vidis la blujn okulojn. Li ne komprenis, kion ŝi diris al li, li embarase ridetis, kiam ŝi karesis la urson. Poste vespere li diris al Miŝa: „Certe, Miŝa, plaĉis al vi la bluaj okuloj de la grandpotenca sinjorino?”

Sinjorino Zoŝka kontraŭe diris al ŝi vespere: „Nagyon szép, vere bela homo.”

III.

Začaljanská dolina ne estis vere tute teda. Sinjorino Zoŝka trovis, ke la vivo en ĝi estas eĉ agrabla, kaj ke la ambaŭ najbaroj estas ĉarmaj. Začaljanská dolina estis senparola kaj silenta.

Vazila povis ĝin imiti kiel ekzemplon kaj ne bezonis hodiaŭ diri: „Ho, vi mia malbenita buŝo, vi, mia sentaŭga lango. Kial mi ĉion elbabilis al sinjoro Ragás?”

Se li estus silentinta, ne bezonis okazi, ke unu tagon sinjoro Ragás strangvoĉe, diris al sinjorino Zoŝka: „Hodiaŭ, mia karulino, mi iras ĉasi urson.”

Kiam li post kvar longaj horoj revenis, li diris tre afable al ŝi, ke unun li mortigis, sed la alia fugis.

Estis vere. Miŝa forkuris montojn Magura.

Post kelkaj tagoj sinjoro Ĝula Ragás ne revenis plu el sia rondiro en sian kabanon. Li malaperis por ĉiam sen iu postsigno.

* * *

Kiam mi iun fojon venis sub Dobšina'n, sinjoro Mikleš, konata en la tuta regiono pro tio, ke li mortigis jam dekduon da ursoj, montris al mi grandan freŝan ursan felon.

„Tion al mi klarigu, mi petas,” li diris, „kiam mi sentripigis la urson, mi trovis en ĝia stomako oran ringon, videble edzegan, en kiu estis gravurite: Zoŝka 19-8/VII.-09.”

El „Dva tucty povídek”
(Du dekduoj da rakontoj)

HÁŠEK.

Jaroslav Hašek (1884 Praha — 1923 Lipnice, ĈSR), ĉeĥoslovaka humoristo, humoristo ne sole de la literaturo, sed ankaŭ de la vivo, verkisto kaj ĵurnalisto, kiu bonhumoron ne sole kreis, sed ankaŭ vivis, granda mistifikanto, estas unu el la plej unuaj — kiel tempe tiel kvalite — verkistoj, kiuj literaturo faris konton de la monda milito. Li majstre kun bonhumoro kaj satiro ridindigas kaj mokindigas la idotecon de la milito en sia mondfama verko „Historioj de la bona soldato Ŝvejk dum la monda milito” (Osudy dobrého vojáka Švejka za světové války. I—IV. 1919—20) kaj en multaj humorplenaj rakontoj, precipe en la kolekto „Dum la milito kaj sovetoj en Rusujo” (Za války i sovětů v Rusku). Lia figuro de babilema, optimista kaj stoika „bona soldato Ŝvejk” konata el diverslingvaj tradukoj, teatraĵoj kaj filmoj fariĝis figuro de internacia monda

literaturo. Hašek estas aŭtoro de granda nombro de groteskaj humoraĵoj, parodioj kaj mistifikaĵoj, en kiuj multaj apartenas al la plej bonaj ne sole en la ĉeĥoslovaka, sed eĉ en la monda humoristika literaturo (tamen multaj estas ne tro valoraj). Ilia kolekto konsistas el pli ol dudek volumoj (Bona soldato Ŝvejk 1912, Malfacilaĵoj de sinjoro Ti-amulo 1912, Gvidanto de fremduloj 1913, Mia vendejo de hundoj 1915, Historioj de Ŝvejk 1920, Du dekduoj da rakontoj 1920, Tri viroj kun unu ŝarko 1921, Paca konferenco 1922, Feliĉa domo, Konfesoj de needziĝinto, Rememoroj de honorinda familio, El malnova drogejo, Pedika historio, Aventuroj de kato Markus, Mia amiko Hanuška, Kiam floras ĉerizoj k. a. krom versaĵoj „Krioj de majo“ 1903). Liaj verkoj estas malŝate preterrigardataj de la oficiala ĉeĥoslovaka literatura kritiko, sed trovas plaĉon eksterlande — tio estas: li havas la saman sorton kiel ĉiuj gloraj boemoj, kiuj per sia vivo, per inklinoj al vagado kaj trinkado, per nedelikataj esprimoj estis ekscitantaj filistrojn de siaj nacioj kaj landoj. Kaj „la lasta ĉeĥoslovaka boemo“ Hašek sukcesplene sciis eksciti ĉeĥoslovakon filistran — kaj ĉeĥoslovaka filistro ne forĝesas. Tial Hašek ne apartenas al la ĉeĥoslovaka literaturo, sed li fariĝas kaj fariĝos glora mondliteraturisto; lia „bona soldato Ŝvejk“ estas kaj restos nemortebla.

B ŝk.

SUPER UNU FILMO...

Jes, tia tio estis, tiel tio estis — tio kaj tia estis kaj estas milito. Tiel estis en ĉiuj armeoj de la mondo, tio estas vera mieno de la milito sen masko de la malvero, hipokriteco kaj fantazio, tiel tion vidis kaj vivis milionoj de tiuj, kiuj trairis la internon de la monda milito.

Jes, tiel fakte vivis, suferis kaj mortis tiuj bonaj, senspertaj kaj mallertaj knaboj, tiuj malpuraĵplenaj, pedikoriĉaj kaj malsategantaj herooj sur la kampo de la honoro kaj gloro. Tiel efektive zorgis kaj kondukis patrinetoj-patrujoj ĉiuj senescepte al siaj filoj kaj de-

fendantoj verŝantaj sian junan varman sangon por ili. Tiel fakte vivis, suferis kaj mortis ili kaj ĉiuj oferitoj de la milito, tiel fakte vivis, suferis viaj filoj, miaj karaj patrinetoj, viaj fratoj kaj amatoj, miaj karaj knabinetoj. Mi ne scias, kiel vi imagas la militan sorton de viaj karuloj, sed mi scias, ke ĝi estis tia, kian vi vidas en tiu ĉi filmo. Tiel ankaŭ efektive vivis, kreskis, spertiĝis, lertiĝis, maturiĝis, viriĝis kaj suferis tiuj, kiuj revenis al vi ne falinte, ne mortinte. Rigardu kaj aŭskultu, vi, patrinetoj, fratinoj, amatinoj kaj edzinoj, vi ĉiuj virinoj en doloroj naskantaj! Viaj koroj sentu la sorton de viaj falintoj kaj mortintoj kaj de viaj revenintoj! Sed vi bone konsciis, ke ne ekzistas rimedo por plene priskribi kaj bildi la tutan teruron de la milito. Eĉ tiu ĉi neordinare fidela filmo ne povas montri al vi dum du horoj ĉion, kio turmentis la korpojn kaj animojn de viaj defendantoj, sangon de via sango, dum kvar eternedaŭraj jaroj. Kaj la minacon de senĉesa danĝero vi ne povas imagi sidante senriske en komforta seĝo...

Ĉiu sceno estas reala, vivanta, ĉar ĉiu efektive okazis; neniu estas elpenaĵo de la fantazio. Ĉiu sceno estas tipa, ĉar ĝi fakte okazis ne unufoje, dekfoje, centfoje, sed milfoje, dekmilfoje, centmilfoje; neniu estas unuopa aŭ malofta escepto, neniu estas escepta okazaĵo. Ĉiu sceno estas karakteriza por la milito ĝenerale, ĉar ĝi ĉiutage okazis en la armeoj de ĉiuj nacioj; neniu estas tipe ununacia — estas erare vidi en la filmo ion speciale germana.

En tio estas premeĝanta forto kaj efiko de tiu ĉi unika filmo: en la severa kaj nobla realismo, en la vereco kaj tipeco de ĉiuj sceno, defalo, gesto, en la negrandiganta kaj nemalgrandiganta, nealtiganta kaj nemalaltiganta, nebeliganta kaj nemalbeliganta, neelpensanta kaj nefantazianta vero, en la ĉiutaga, viva kaj reala vero, kaj en la sola, senalmiksa vero.

La tuta filmo estas unika realisme fidela bildo de la terure granda internacia kaj tufhomara sufero sur ĉiuj batalkampoj de la monda milito, ĝi prezentas la veran, senmaskan fizionomion de la milito, ĝian efektivan ka-

rakteron, ĝian propran esencon, kvankam ĝi bildas sole unu ĝian flankon: vivojn, suferojn kaj mortojn de la batalantoj, netuŝante agojn de ĝiaj direktantoj, iniciatintoj kaj rikoltantoj. Ĝi tuŝas unu flankon de la milito, sed tiun plej kruelan: la rompon de la plej junaj, ankoraŭ nematuraj vivoj. Tiel ĝi tuŝas la plej grandan krimon de la monda milito. Ni plenaĝaj kaj plenkreskaj viroj povis kun rezigno kaj fatalismo porti nian mizeron, sed, kiel povis rezigni junaj knaboj, infanoj sur la sojlo de siaj vivoj, plenaj de vivovolo kaj esperoj?

Tiu ĉi filmo kontentigas ĉiujn, kiuj ne timas, sed deziras vidi kaj aŭdi la veron pri la plej granda kaj terura okazaĵo en la historio de la homaro. Tiun ĉi filmon povas senhezite fidi feliĉega partopreninto de la milito deziranta havi almenaŭ proksimuman imagon pri la granda pasinta hombuĉado en la jaroj 1914-18 kaj pri la venonta en la jaroj ne tro malproksimaj. Tiu ĉi filmo povas impresas ĉiun partopreninton de la milito pro siaj seriozaj kompreno kaj sento por la faktoj kaj pro la pureco de ilia sensensacia kaj sentendenca prezento, sen kutima naiva sentimentala romantismo. Ĝi atingas maksimuman fidelecon, kiun la filmo povas havigi. Tiu ĉi filmo povas malplaĉi sole al malfortaj senkuraĝuloj timantaj la veron.

La filmo „En la okcidento nenio nova“ estas belega kaj bonega verko, ĝi estas granda kaj estiminda faro — honoron al ĉiuj ĝiaj kunlaborantoj! Estus dezirinde, ke ĉiu homo ĝin vidu, ke ĉiuj homoj, precipe virinoj kaj junularo, povu ĝin vidi tia, kia ĝi estas nun: sen proponataj ŝanĝoj, ĉar ĉiu ŝanĝo estus kruela perdo por la filmo kaj por la vero, ĝi estus krima kripligo de la verko kaj de la vero. La veron mem perfortas kaj subpremas ĉiu, kiu malebligas la prezenton de tiu ĉi verko.

La filmo „En la okcidento nenio nova“ estas unua kaj ĝis nun sola, kiu uzas la temon pri la milito honeste, sen malpuraj sensaciemo kaj tendencemo. Ĝi estas unua kaj ĝis nun sola filmo (krom la parenca „Kvaro de la infanterio“), kiun la partopreninto de la monda milito povas rigardi sen malkontento, maldolĉo, indigno, kolero, doloro kaj ofend-

sento, sen malagrabla sento, ke la filmo — scie aŭ nescie — sole mokas, blasfemas kaj ridindigas la grandajn suferojn kaj grandajn oferojn de milionoj. Ĉiuj ĝisnunaj — tre multaj, ofte tre multekostaj kaj artaj — filmoj pri kaj el la milito plejparte konscie, parte eĉ senkonscie erarigas kaj trompas neinformitojn kaj indignigas, kolerigas kaj ofendas informitojn per naivaj, sensencaj, malveraj, neblaj, nenaturaj, kontraŭnaturaj, fantaziaj scenoj kaj detaloj, kiuj neriam povis okazi kaj neniam okazis, aŭ kiuj okazis escepte, hazarde aŭ tute alimaniere aŭ eĉ male. Ĉiuj ĝisnunaj militaj filmoj estante inspiritaj kaj diktitaj de sensaciemo kaj tendencemo prezentas senvivajn kombinaĵojn de la fantazio, kontraŭe tiu ĉi filmo estas unua milita filmo inspirita kaj diktita de la pura veremo prenanta objektive faktojn el la reala vivo. Tiu ĉi filmo estas unika pro sia pura artisme uzita realismo. Tion scias laŭmerite ŝati ĉiu amanto de la vero, tion ne scias ŝati sole mensoguloj, malfortuloj, senkuraĝuloj kaj perfortuloj.

Kiu partoprenis la mondan militon kiel fronta soldato kaj vidis la ĝisnunajn filmojn pri kaj el tiu monda katastrofo, tiu vive sentas kaj kontente konstatas: jen unu serioza verko, kiu ne estas blasfemanta komedio, jen unu serioza verko, kiu estas fidela bildo de la milita teruro, kiel fidele la homaj fortoj estas kapablaj ĝin imagigi!

Mi deziregus havi rimedojn por ebligi al ĉiu vidi ĝin.

Dankon al ĝiaj kreintoj!

Bouška.

Hermann Haefker:

JARMILOJ PASAS

Universala mondhistorio, en du volumoj.

Originalo en Esperanto

11 geografiaj karto, 6 artaj reproduktaĵoj
I. vol. 245 p.

Duonlede b'ndita 80 Kĉ afrankite

KIO ESTAS LA ETERNECO

La eterneco estas la nokto pasigita sen dormo pro dentodoloroj.

La eterneco estas la lasta semajno de la lerneja instruado, antaŭ la ferioj.

La eterneco estas la lasta semajno en la monato, antaŭ ricevo de la salajro.

La eterneco estas la kvaronhoro, dum kiu vi atendas sur la interkonsentita loko vian amatinon.

La eterneco estas vico de la monatoj, kiuj pasos antaŭ ol la teatro enscenigos vian novan teatraĵon.

La eterneco estas por junulino la posttagmezo antaŭ balo, antaŭ ol la kudristino alportas al ŝi la novan robon.

La eterneco estas la kvin minutoj antaŭ ol la restoracia knabo alportas al vi la unuan bieron kaj la dek minutoj antaŭ ol vi sukcesas venigi la ĉefkelneron por ke li prenu la monon.

La eterneco estas por la fumanto la ĉefa paŭzo en la teatro, en kiu oni ne rajtas fumi.

La eterneco estas la reveno el piedekskurso, kun piedkalo en tropremaj botoj.

(Jen kelkaj el definicioj publikigitaj de ksg en L. N.). Ni aldonas:

La eterneco estas la tempo, kiun bezonas multaj el niaj abonantoj por decidi, ke por la mendita Progreso ili devas sendi abonpagon.

Atentu pri la tabako. Iu oratoro klarigis foje en kunveno de vilaĝanoj, ke per tio, ke ili fumas, ili pagas altan imposton. Por plej klare dokumenti sian aserton, li turnis sin al iu maljuna vilaĝano, kiu lin aŭskultis suĉante sian pipon. „Ekzemple do, — diris la oratoro, — vi fumas ĉiutage tiom kaj tiom da pipoj. La ŝtato vendas al vi tiom kaj tiom da tabako. Ĝi profitas ĉe tio tiom kaj tiom kaj ĉi tio estas imposto, kiun vi pagas per via fumado.“ — „Mi pagas nenion — diris la maljunulo. — „Aŭskultu min do bone, kara paĉjo. Mi ripetos — (nova klarigo). Kaj vi do vidas!“ finis venkoglore la oratoro. — „Mi pagas nenion,“ respondis la maljuna paĉjo. „Vi estas tre obstina, kara avo. Sed mi ankaŭ. Pro tio mi ĝin klarigos al vi ankoraŭ unufoje...“ — Sed tio estas tute senbezona — respondis frankvile la maljuna vilaĝano. — Mi ne fumas tabakon, mi fumas foliojn — nuksarbajn.

Patro, kiel oni ekkonas, ke iu estas ebria?

Estas tiel, filo: jen en la angulo sidas du homoj. Kiam vi vidos tie kvar, vi estos ebria.

Sed paĉjo, en tiu angulo sidas ja sole unu homo?!

La ŝtoniĝintaj restoj de maraj animaloj, trovataj alte sur kontinento, faris al antaŭaj sciencistoj multajn zorgojn. La rom-grekaj scienculoj trovis por tio la naturan klarigon: tie simple iam troviĝis maro kaj ŝlimo. Sola Theofrastos konjektis, ke hazardo alportis en la ŝtonojn fiŝovojn, el kiuj evoluis ŝtonaj fiŝoj. En la mezepoko, ekzemple Albertus Magnus, oni faris klarigon, ke „sur la koncernaj lokoj estiĝis malsekeco kaj tiu kaptis en sin spiron de la vivo“. Iuj esploristoj de la 16—18 jc. klarigis tion per krea forto de saloj, troviĝantaj en la sino de la tero, aliaj vidis en tio influon de la steloj, ree aliaj belajn erarojn de la naturo. Ankoraŭ Martin Lister (1638—1711), la persona kuracisto de la reĝino Anna Angla, kredis ke „nekonata potenco imitis en ŝtono formojn de maraj konkoj kaj fiŝoj“; Luidius instruis, ke la maraj vaporoj forportis en rokojn kaj tertavolojn spermajn de fiŝoj kaj de aliaj animaloj, el kiuj evoluis tiuj naturformoj. Karl Nikolaus Lang defendis la opinion, ke la spermaj de la vivantaj maranimaloj, dise troviĝantaj sur la tero vekigis sub influo de la magnetismo kaj de la varmececo, kaj „vis plastica“ en ili dormetanta evoluis al la formoj en la ŝtonoj.

Profesoro Masaryk, la nuna prezidento de CSR, petata antaŭ jaroj, ke li por la enketado de la ĵurnalo Ĉas (Tempo) nomu 10 plej bonajn librojn, nomis 22 librojn, kiuj laŭ lia juĝo reprezentas la evoluon de la eŭropa homaro. Ili ĉiuj estas verkoj de grandaj eŭropaj poetoj kaj pensuloj. La ĉefajn aŭtorojn reprezentas J. S. Machar per sia libro Konfese literata (Konfeso de literaturisto).

GEKOLEGOJ INSTRUISTAJ!

Mi sukcesis instigi la „Edukan Komitaton de la Germana Unuiĝo por Ligo de Nacioj“, eldoni la porinfanan gazeton por la 18-a de Majo (Tago de Bonvolo) ne nur en angla, franca kaj aliaj lingvoj, sed ankaŭ en Esperanto. La prezo estos 5 germanaj markoj po 100 ekzempleroj (inkl. de sendkostoj ktp.). Bonvolu mendi — ankaŭ pro la propaĝando de Esperanto en la Ligo de Nacioj — por viaj ĝelernantoj kiel eble plej grandan kvanton da ekzempleroj de ĉi tiu gazeto jam nun ĉe la sekretario de „Kunlaborado“: f-ino Martha Moelke, Brandenburgische Str. 5, Berlin-Süddende (Germanujo). Poŝtĉekkonto: Berlin 131530.

D-ro Dietterle,

ano de la Eduka komitato de la Germana Unuiĝo por Ligo de Nacioj.

BULTENO

DE ĈEHOSLOVAKA ASOCIO ESPERANTISTA, PRAHA VII. SOCHAŘSKÁ 333.
NUMERO 34. - FEBRUARO 1931.

Invito al la

XII. ĝenerala kunveno de Ĉehoslovaka Asocio Esperantista

okazanta en Praha
dimanĉon, la 19-an de aprilo 1931 je
la 8-a horo matena en kafejo Urbanova,
Václavské náměstí 33, I. etaĝo
(dua domo super Jindřišská strato).

Programo:

1. Protokolo de la lasta ĝen. kunveno.
2. Raportoj pri la agado kaj pri la kaso.
3. Raporto de la revizoroj.
4. Elektaj por vakiĝintaj lokoj komitatataj.
5. Liberaj proponoj. (Sendotaj ĝis la tria tago antaŭ la kunveno.)

La komitato.

Ni petas niajn membrojn, ke ili bonvolu veni plej multnombre. Ĉar la raportoj pri la agado estos enpresitaj en la marta numero de la Bulteno, kiun ni sendigos al ĉiuj membroj, eĉ al neabonantoj de la Progreso, la kunveno verŝajne ne insistos ĝin legi. Tiamaniere restos pli da tempo por amika kaj ĝojiga diskuto pri farito kaj faroto. — Denove ni atentigas pri la § 16-a de la statuto, laŭ kiu membroj nepovantaj ĉeesti persone povas reprezentiĝi sin per la ĉeestantoj. — Same ni atentigas pri la § 17-a, laŭ kiu la kunveno estas decidrajta se partoprenas almenaŭ kvarono de la membroj (persone aŭ reprezente). Se ne kunvenis tiu nombro, okazas post unu horo nova kunveno, kiu estas decidrajta sen atento de la nombro.

VI. KOMITATA KUNVENO DE ĈAE

okazis la 14. Januaro 1931 en Praha, kafejo Union. Ĉeestis: S-roj Brambora, Ginz, Hromada, Janda Jos., Dr. Pitlík, Slavík, Sustr; gastoj prof. Kl. Urban kaj S-ro Waldstein. Senkulpigis sin S-inoj Herzigová kaj Tarantíková. — Malfermo 20.30, fina 0.15.

La ĉefa punkto de la kunveno estis la afero de la filmo „La Bela Danlando“, pri kiu

ni publikigas specialan artikolon. El la aliaj punktoj ni citas:

Skoltoj.

ICK informas pri la tendaro de Skolta Ligo Esperantista okazanta en Julio 1931 apud Budapeŝt. Ni atentigas la skoltan organizaĵon ĉehoslovakon kaj disvastigos artikolon en ĉs. gazetaro.

Esp. gvidlibro de Touring Club Italiano.

Tiu ĉi organizaĵo eldonis gvidlibron en esperanto pri Milano kaj la lagoj de Lombardio. La verda volumo havas 120 p., 8 kartojn kaj 9 kolorplanojn, kostas 14 lirojn (ĉ. 25 Kč) kaj pro sia serioza enhavo kaj bela aspekto povas esti komparata al la konataj Baedeker-libroj. Laŭ la deziroj de la italaj esperantistoj ni atentigas pri la libro niajn membrojn, kaj ni estas pretaj havigi la libron al ili.

Parolanta filmo en esperanto.

Jugoslava samideano prof. Novljan, loĝanta nun en Praha, korespondas kun ni pri tiu ĉi afero. Lia projekto pri kunlaboro kun la aliaj naciaj societoj de malgrandaj nacioj estis de ni transdonita al ICK.

Esperanto en „Slovíčko“.

Ni gratulis al la redakcio de České Slovo pro la enkonduko de la esperanto-kurso en Slovíčko, kiu estas ĉiudimanĉa porinfana aldono al Ĉ. Sl., presata en 280.000 ekz. Intereson pri la kurso montris multegaj infanoj kaj ankaŭ plenaĝuloj. F-ino Šupířová meritas sinceran dankon pri sia senlaca laborado.

Diversaj aferoj.

Donaco de S-ro Kühnl. (Vidu la artikolon.) Ni dankis al S-ro Kühnl kaj samtempe invitis lin al aktiva kunlaborado en nia movado.

Domáci učení. En skribaj kursoj publikigataj de la popolkleriga institucio „Masarykův lidovýchovní ústav“ aperas nun kurso de Esperanto, skribita de S-ro Eiselt, nia estinta prezidanto.

Komercaj tribunaloj. Informon pri ili donis nia komitatano S-ro Dro Jos. Foušek, advokato en Přelouč, al advokata societo en Antwerpen.

Gvidlibro Plzeň. Ni gratulis al la urbo Plzeň pri la eldono de esp. teksto.

Arkivo. S-ro Novák Fr. en Praha, nia es-tinta kasisto donis al ni precizan informon pri la asociaj presajoj kaj broŝuroj, kiun li afable lasas deponitaj ĉe si, ĉar la Asocio ne havas ĉambron taŭgan por tio.

Raportoj pri la movado en ĈSR. En januaro ni dissendis al ĉiuj grupoj deman-daron pri ilia nuna stato. Grupoj ne respon-dintaj estas petataj ne prokrasti la aferon, ce-tere facile plenumeblian. Resendu eĉ tiuj, kiuj povas raportii sole, ke ili ekzistas. — Ni ne de-ziras fanfaroni per kluboj surpaperaj kaj stre-kos do tiujn, kiuj ne plu ekzistas.

VII. KOMITATA KUNVENO DE ĈAE

okazis merkrede la 4. Marto 1931 en Praha, kafejo Union, Ĉeestis: S-roj Ginz, Hromada, Janda Jos., Dr. Pitlík, Slavík, Šustr, pli poste S-inoj Herzigová kaj Tarantíková. Senkulpigis sin Dro Fousek, leterojn al la kunveno sendis Dro Kamaryt kaj S-ro Sklenčka. — Malfermo 20.30 h., fermo 23.30 h.

El la aferoj traktitaj ni publikigas, escepte la konfidencajn, la jenajn:

Dana filmo.

Sur alia loko ni publikigas pli malpli detalajn raportojn pri la lokoj, kie la filmo estis pre-zentita. Generale dirite ni povas esti kontentaj, pro la sukcesa laboro de niaj samideanoj. Ni dankas kore al ili kaj esperas, ke la intereso vekita de la filmo en la publiko kaj la ler-nantaro portos siajn fruktojn favorajn al nia afero. La filmo nun troviĝas en Praha. Laŭ la telegramo ricevita la 3. Marto el Kōbenhavn la filmo devas esti en Amsterdam nur la 28. Marto. Ni demandis Košice kaj Brno, kies ne-fiksan mendon por marto ni devis rifuzi, ĉu estas tie ankoraŭ intereso. Ni skribis ankaŭ al GEL. Pri la financa rezulto, kiu estas bona, ni raportos post forsendo de la filmo kaj post pago de ĉiuj koncernaj fakturoj.

Mallongonda disaŭdigo el Praha.

La mallongonda radiostacio en Praha, pri kiu ni skribas sur alia loko, disaŭdigis laŭ nia iniciato siajn diversajn informojn ankaŭ en esperanto, por atentigi la esperantistajn amatorojn. La esp. disaŭdigo okazis proksimume de 20 Novembro ĝis 10 Decembro 1930. Ni provos, ke la esperimentoj estu daŭrigataj, por ke nia gazetara informo pri ili povu atingi

ankaŭ la radiistojn en la malproksimaj landoj, ĉar la stacio deziras esti kontrolata pri sia aŭdebleco precipe ekster Eŭropo. Se venos sufiĉe multaj konfirmoj, estas espero, ke espe-ranto fariĝos unu el la oficialaj lingvoj de tiu stacio. Ni traktas pri la afero kun la Internacia Radio-Servo.

Esperanto-himno sur gramofon-diskoj.

Direktoro Bakule, estro de la fama infana horo kantista, informis nin, ke la horo sur-kantis nian himnon sur gramofonan diskon, kiu estos jam baldaŭ aĉetebla. La nomita horo, kiu per siaj artaj prezentadoj estas konata en ĉiuj eŭropaj landoj kaj ankaŭ transmare, kantis nian himnon, brile instrumentitan de la ĉeĥa komponisto Křička, dum la konferenco Paco per Lernejo en Praha 1927. La Espero estas kutime la unua programpunkto de la horo dum ĝiaj vojaĝoj en eksterlando. La disko enhavas krom La Espero sur la sama flanko (sed kun sufiĉa interspaco, por ke nia himno estu aparte ludebla) la skoltan himnon ĉeĥe kantitan, sur la alia flanko la internacian himnon de la Ruĝkruca junularo, kantatan en tri lingvoj. Ni baldaŭ informos la membrojn pri la prezo de tiu disko.

Poŝtkartoj kun esp. teksto en Liechtenstein.

En kontakto kun ICK nia gazetara servo, kun helpo de niaj bonvolaj kunlaborantoj, sukcesis publikigi pliajn 22 informojn. Entute estas nun 52 informoj aperintaj en ĈSR, inter ili 34 ĉeĥaj kaj slovakaj.

Demandaro al la kluboj.

Demandarojn resendis al ni ĝis nun 25 kluboj. Ili enhavas tre interesan materialon, kiun ni prilaboros kaj publikigos. Mankas nun informoj pri kelkaj kluboj en Slovakio kaj en Silezio. Precipe pri tiu ĉi regiono nia Asocio estas sen precizaj informoj. Ni petas pri baldaŭa respondo. Kluboj, kiuj eventuale ne ri-cevis la demandaron, petu ĝin de ni.

Ĉeĥoslovaka Antologio.

Ĝis nun ni atendas respondojn al nia alvoko en la lasta nro (pago 98) pri la Literatura Sekcio. Intertempe la komitato decidis komenci preparojn por eldono de ĉeĥoslovaka antologio. Klariga letero pri tio estos dissendita la 15. Marto al diversaj ĉsl. samideanoj kun peto kunlabori.

Esperanto-Taĝo en Pardubice 28. Junio 1931.

Dum tiu ĉi somero okazas en Pardubice la Ekspozicio de la Korpa eduko kaj Sporto. La

ekspozicia komitato rezervis la taĝon 28. 6. por esperantistaj entreprenoj. E. Klubo Pardubice estas preta aranĝi sabate la 27. Junio belan vesperon kun arta programo, kaj proponas aranĝi tie V. Ĉeĥoslovakon kongreson aŭ Esperanto-Taĝon Internacian aŭ Regionan kunvenon Orientbohemia. Pere de nia komitatano S-ro Sklenčka ni prezentis la aferon la 2. Marto al GEL. Ĉar la 29. Junio (lundo) estas festotago oficiale rekonata, la kongreso, kiu havus du kunvenojn (dimanĉe kaj lunde matene) estas aranĝebla. Skribu al ni viajn opiniojn. Pri la rezulto de la traktado ni informos espereble jam en la venonta numero. Intertempe ni petas ĉiujn grupojn esperantistajn: Ne faru aliajn aranĝojn en fino de junio. Ni klopodos, se Sinjoro Cseh iros al Lázně Běláhrad (vidu UEA-paĝon), ke li partoprenu la aranĝojn en Pardubice.

Lernejoj kaj esperanto.

Laŭ la artikolo de docento D-ro V. Přihoda (unu el la preparantoj de la konferenco Paco per Lernejo) en la oficiala gazeto de instruistoj de la burĝaj lernejoj, esperanto troviĝas inter „elekteblaj objektoj“ en la nova instrua plano por la burĝaj lernejoj. (Vidu ankaŭ la artikolon de F-ino Šupichová en tiu ĉi n-ro.) — Al la ministerio de instruado ni turnis nin kun nova letero en certa afero.

Rilatoj kun niaj centraj institucioj.

K. R. konfirmis al ni (en letero de 9. I.) paĝon de la kotizo por 1928 kaj 1929. Por la jaro 1930 ni estas pagontaj antaŭ junio 1931. — ICK gratulis al la urberstraro de Plzeň pro enmeto de espoteksto inter lingvojn de ĝia propaĝanda gvidlibro. — ICK sendis al nia ministerio de fervojoj gratulon pro eldono de la gvidlibro pri Tatry-montaro. Ni skribis al ICK pri propaĝando inter Rotary-anoj. — Krom aferoj jam publikigitaj ni traktas kun ICK pri entreprenoj, kiuj devas resti ankoraŭ konfidencaj, ĉar ili estas en fazo de preparoj.

Varba numero

de nia Bulteno aperis kiel ĝia 33. n-ro. en 3000 ekzempleroj, kaj estis dissendita al ĉiuj abonantoj de La Progreso kaj al la membroj. Ni bezonas pluajn adresojn de esperantistoj en CSR kaj denove ripetis alvokon presitan sur p. 85. Ĉiu kiu instruis en kurso dum lastaj du jaroj, bv. sendi al ni ĉiujn adresojn de la kursanoj. Sekretarioj de la kluboj bv. nepre trarigardi la nomarojn de la membraro kaj kopii por ni adresojn de ĉiuj anoj enskribitaj dum la lastaj kvar jaroj, eĉ de

tiuj kiuj neniam venas en la kunvenojn. Ĉiu izolulo kiu legas tion ĉi, informu nin pri adresoj de esperantistoj de via loko kaj ĉirkaŭaĵo. Plenumu tiun ĉi insistan peton, kiu kostas al vi sole kelkminutan laboron kaj 50 heleran poŝtkarton. Al Asocio vi faros per tio grandan servon!

Diversa:

Zamenhof-placo en Boulogne-sur-Mer. Laŭ la peto de la iniciatinta Federacio de Esp-istaj Grupoj de Norda Francujo ni dankis la urbestron kaj la estron de la fervoja kompanio, al kiu la placo apartenas.

Samojloviĉ. Nia sekretario S-ro O. Ginz sukcese intervjuis pri esperanto la polusan esploranton prof. Samojloviĉ dum lia vizito en Praha. (Vidu artikolon sur p. 105.)

Skoltoj. La ĉsl. skolta organizaĵo promesis, ke ĝi pri la Internacia Skolta Tendaro en Budapeŝt atentigos per cirkuleroj kaj en siaj gazetoj.

Japana esperanto-filmo. Ni demandis la japanan fervojan ministerion pri kondiĉoj, laŭ kiuj estus pruntebla por nia lando la filmo „Kvar sezonoj en Japanujo“.

Varbado. Nia fidela membro S-ro Vladimír Jukl, profesoro ĉe la Komerca Akademio en Bratislava, aliĝis por jaro 1931 kiel subtenanta membro kun kotizo 50 Kč. Ni dankas lin sincere por tiu imitinda faro kaj esperas, ke ĝi fariĝos modelo por pluaj.

Dana Ligo. Ni donacis al Centra Dana ligo esp. 1 ekz. de „Malriĉa knabo kiu gloriĝis“ por rekompensi al ĝi libron senditan al ni siatempe dum korespondado pri esperantaj sciencaj resumoj. — Peto pri monsubteno veninta al Danlando el nia lando estas esplorata.

Ministerio de fervojoj. Ĉar la provizo de la poŝtkartoj pri Ĉeĥoslovakio estis elĉerpita, la ministerio sendis al pliaj pefantoj po unu pk kun esperanta klarigo pri la elĉerpiĝo de la serioj.

Vojaĝo de prof. G. Peter Pamporov. D-ro Aleksandr Sommer Batěk afable informis nin, ke la nomita bulgara samideano intencas aranĝi en aprilo majo paroladojn en ĈSR pri „Signifo de la vegetaranismo“, „Lando kaj popolo de Bulgario“, „Lando de la rozoj kaj montoj“, kun lumbildoj. Ni publikigas tiun ĉi informon por event. uzo de niaj membroj kaj kluboj.

Domo de etikaj organizaĵoj en Praha. Komuna komitato de tiuj ĉi organizaĵoj, al kiuj ankaŭ la nia estas kalkulata, intencas konstrui en Praha domon, kie troviĝus klubejoj

por la organizaĵoj, salono por paroladoj, ĉambroj por ekspozicioj kaj ĉambroj por fransnòktiĝo de delegatoj el provinco. Ĝi demandas nin, per kiu sumo ni ev. povus kontribui ĉu donace ĉu prunte. La prunto povus esti rentumata, repostulebla, kaj sekurita hipoteke. Ni prezentas tiun demandon al niaj membroj. Seriozaj intereshavantoj povas ricevi pliajn detalojn. Se el inter la esperantistoj troviĝos neniu financa partopreno, estos malfacile poste postuli lokon ankaŭ por ni, kvankam ni treege bezonus tian aranĝon.

Parolanta filmo ĉeĥoslovaka: „Laŭdo de la patrujo“, estas oficiale preparata. Laŭ informo de D-ro Pitlík estas projektata ankaŭ esperanta teksto.

R. H.

DANA FILMO EN ĈEĤOSLOVAKIO:

En Praha.

En Praha la filmo „La bela Danlando“ estis projekciata en kino „Alma“ ĵaŭde la 5. Februaro 1931 vespere, je kostoj de ĈAE. La kino havanta 700 lokojn estis komplete okupita. Ankorau je la 20-a horo longa vico sin premis ĉe la kasejo. Ĉe tiu ĉi prezentado kunvenis multaj esperantistoj de Praha, ankaŭ longa vico de la malnovaj, nun ne plu aktivaj samideanoj; esp-istoj de Praha uzis la okazon por venigi siajn konatulojn kaj montri al ili, ke esperanto estas uzata. Ĉeestis oficialaj senditoj de la dana legacio en Praha, Danaj loĝantaj en Praha, senditoj de la ministerioj eksterlanda, komerca kaj lerneja, kaj redaktoroj de ĵurnaloj de Praha. Sur la kinejo pendis flagoj esperantaj, la antaŭo de la salono estis ornamita per dana kaj ĉsl. flagoj. La komenco bedaŭrinde iom malfruiĝis kaj je la 20.30 la horo de Bakule ekkantis esperantan himnon. Sekvis mallonga alparolo de S-ro Ginz en la nomo de ĈAE, F-inoj Roušková kaj Deylová kantis danan kanton kaj ree la Bakule-horo kantis kanton pri Daĝmar, danan himnon dane kaj esperante. — Sekvis la filmo, tre interesa kaj instrua, kiu daŭris kun la kutima paŭzo ĝis 22.30. Se ni deziras resti objektivaj, ni devas esprimi nian opinion, ke la efiko de la filmo estus pli granda, se ĝi estus iom malpli longa. Ankaŭ la titoloj estus pli efikaj, se ili estus pli koncizaj, pli telegrafstilaj. Malgraŭ tio la propaganda rezulto de la filmo por Danlando kaj same por esperanto estis bonega. Estas interese, ke ankaŭ la financa rezulto por Asocio estas treege kontentiga.

Ni rigardas justa noti, ke ĉiujn preparojn

lerte kaj diligente plenumis en la nomo de Asocio ĝia sekretario S-ro O. Ginz, kiu zorgis la korespondadon kun la Dana Ligo, zorgis pri veniĝo, doganiĝo, reklamo de la filmo, traktis kun multaj kinejoj por trovi la plej konvenan al ni ktp. S-ro Waldstein zorgis per sia, jam tiomfoje elprovita lerteco kaj sindomeno, pri disvendado de la biletoj. Lin helpis 14 samideanoj de E. Kl. Praha, la ceteraj aĉetis biletojn nur por si mem. Tri personoj, S-roj Waldstein, Ginz kaj Bloch, disvendis la plej grandan parton da biletoj.

rh

Dana filmo en lernejoj de Praha.

ĈAE sendis cirkuleron al ĉiuj duagradaj lernejoj de Praha, proponante la prezentadon de la filmo. Anoncis sin la gimnazio „de Drtina“ en Praha—Smíchov, kie la filmo estis projekciata vendrede la 6. Februaro. Tie la esp. titoloj estis tradukataj de S-ro Baroch. — La 12. Februaro estis aranĝita prezentado de la filmo en kino Alma por 400 lernantinoj de reala gimnazio „Krásnohorská“.

Dana filmo en Bakov.

En tiu ĉi urbo, kuŝanta 80 km nord-oriente de Praha, la filmo estis projekciata dufoje, la 10. Februaro, per zorgo de S-ro Fr. Pytloun. Posttagmeze vidis ĝin 500 infanoj kun siaj ĝeinstruistoj, vespere 150 personoj el la loĝantaro. Rezultis financa profito, kiun S-ro Pytloun donacis al la lokaj lernejoj.

Dana filmo en Slovakio.

En Trnava kaj Bratislava po 4 prezentadoj por 3600 p.

Prof. Vlad. Jukl vidinte ne sufiĉan intereson en la historiaj landoj, prizorgis prezentadon en Bratislava kaj traktis kun Košice (Friedrich), Žilina, Trenčín (Zoubek), Trnava (Lukáš) kaj Nové Zámky (Badin). Plenan komprenon montris prof. Lukáš en Trnava, kiu sukcesis la 18. kaj 19. Februaro organizi 4 prezentadojn por lernejoj en kino Radio, bonege vizititajn. La filmon vidis ĝelernantoj de lernejoj burĝaj, agrikultura, komerca, mastrina, gimnazio, pedagogia instituto kaj teologia seminario.

El Trnava la filmo venis al Bratislava, kie ĝin prezentis porkultura societo Osvetový Sváz la 20. Februaro en t. n. Spegulsalono de la Urba domo (kie okazis la III. ĉsl. kongreso esp. en 1926). La salonego estis plenplena kaj partoprenis multaj lokaj eminentuloj. Prof. Jukl slovake kaj germane donis koncizajn klarigojn. La filmo malgraŭ ĝia longeco plaĉis. Ĉeestis pli ol 300 personoj.

Plie okazis 2 prezentadoj en kino Reduta

(la 20. Febr. je la 10 h kaj 14 h) la sekvintan tagon, la 21. Febr., plia prezentado je la 14.30. Partoprenis entute pli ol 3300 gelnantoj el slovakaj, germanaj, hungaraj lernejoj burĝaj, duaĝradaj kaj fakaj. — Post la prezentado aperis en lokaj gazetoj favoraj recenzoj.

La 27. Febr. parolis en Bratislava la fama dana verkistino Karen Michaelis pri Gepatroj kaj infanoj. Ĉeestis ŝian paroladon reprezentantoj de la loka esperantistaro, kiu prezentis al ŝi saluton.

Dana filmo en Prostějov, 4 prezentadoj por 2400 personoj.

Per zorgo de S-ro Frant. Heikenwälder en tiu ĉi moravia urbo okazis 3 prezentadoj por lernantoj de la burĝaj kaj duaĝradaj lernejoj, la 24. Februaro je la 11 h. kaj 14 h., kaj la 25. Februaro je la 11 h. Entute vizitis tiujn ĉi 3 prezentadojn ĉ. 2000 lernantoj kaj 80 profesoroj kaj instruistoj. La kvara, publika prezentado okazis la 25. Febr. vespere; ĉeestis ĉ. 350 personoj. Invito okazis per afiŝoj kaj specialaj invitiĵoj al ĉiuj redakcioj, ŝtataj kaj urbaj institucioj, societoj ktp.

Dana filmo en Kladno (2000 p.).

En tiu ĉi urbo de karbominejoj kaj ferfandejoj, 30 km okcidente de Praha, la filmon prezentis per zorgo de Esperantista Klubo la Distrikta Porkultura Societo. Okazis 3 prezentadoj la 27. kaj 28. Febr. vizititaj de ĉ. 2000 lernantoj de ĉiuj urbaj popollernejoj, burĝaj lernejoj, plie studentoj de la reala lernejo kaj pedagogia instituto. Nature ĉeestis ankaŭ iliaj instruistoj, profesoroj kaj direktoroj. La filmo estis iom mallongigita. La E. Klubo disdonis ĉe tiu okazo propagandajn flugfoliojn pri espo.

Dana filmo en vilaĝo Dubí apud Kladno.

Ankaŭ ĉi tie, per zorgo de F-ino B. Vlčeková, oni vidigis la filmon al la publiko, al kiu ĝi multe plaĉis. Ĉeestis ĉ. 300 p. La senlaburoj povis viziti la prezentadon senpage.

KIE KUNVENAS ESPERANTISTOJ?

Antaŭ nelonge ni dissendis al ĉiuj konataj adresoj klubaj (entute pli ol 50) peton, ke la kluboj informu nin i. a. pri la tago, horo kaj ejo de siaj kunvenoj. Ofte okazas, ke samideano venas en iun urbon, kie ekzistas Esperanto-Klubo, kaj li dezirus viziti la kluban kunvenon. El la respondoj ni starigis la liston, kiun ni jene publikigas. Eventualajn ŝanĝojn, korektojn kaj kompletigojn bv. tuj sciigi al ni, por ke ni povu publikigi ilin en la venontaj n-roj. Nur tiamaniere la listo estos fidinda.

Bratislava. Esperanto-Klubo, Mardon kaj Vendredon je 19.30 h., Dimanĉe de la 17 h., en la propra klubejo, strato Vyarica, 16.

Brno. Esperantista-Klubo, Mardon, 19—21 h., en la lernejo strato Veveří.

Břeclav. Esperantista Rondeto, London (ne: en julio kaj aŭgusto), en la lernejo „Žlutá škola“, strato Vítězná ulice.

České Budějovice. Esperantista Klubo, Vendredon, 20 h., en kafejo „Korso“, II. et.

České Budějovice. Esperantista klubo „La Progreso“, Dimanĉon, 10—12 h., en restoracio „Protivínská pivnice“, strato Žižkova ul.

Horní Jindřichov ap. Rumburk. Amika esperantista rondeto „Hraničář“. Sabato, 20 h., en la doganejo („pohraniční celnice“).

Kladno. Esperantista Klubo, ĉiun duan kaj kvaran Dimanĉon, 10—12 h. matene, en hotelo „Živnostenský dům“, placo Wilsonovo nám.

Kolín: Esperantista Klubo, ĉiun unuan kaj kvaran Vendredon, 20 h., en hotelo „Lidový dům“, strato Zámecká.

Košice. Esperantista Klubo, ĉiun duan kaj kvaran London, 20 h., en kafejo „Astoria“.

Kuťná Hora. Esperantista Klubo, Vendredon, 20 h. en hotelo „Žluté kolo“.

Liberec. Ĉeĥa Esperanto-Klubo, ĉiun duan kaj kvaran Mardon, 20 h., kie?

Mnichovo Hradiště. Esperanta Grupo „Verda Stelo“, Mardon, 20 h., en hotelo „U nádraží“.

Moravská Ostrava-Vítkovice. Esperantista Klubo, Merkredon, 19 h., en la sindikata domo „Odborový dům“ en Vítkovice.

Olomouc. Esperantista Societo, Jaŭdon, 20 h., en restoracio de „Národní dům“.

Pardubice. Esperantista Klubo „Dro Schulhof“, Merkredon, 20 h., en industria muzeo „Průmyslové museum“.

Pizeň. Esperantista Klubo, Sabato, 20 h. en rest. „U nové pošty“, parko Kramářovy sady, 23.

Praha. Esperantista Klubo, Vendredon, 20 h., kafejo „Louvre“, strato Národní, I. etaĝo.

Praha. Ligo de katolikaj esperantistoj en ĈSR, Jaŭdon, 20 h., en abstinenca restoracio, strato Ostrovní, 18.

Praha. Laborista Klubo, ĉiun unuan Mardon, 20 h., en rest. Odborový dům, Perštýn 11.

Praha. „Verda Stelo“ (germ. esp.), Jaŭdon, 20 h., en kafejo „Urban“, placo Václavské nám., 33, I. etaĝo.

Prostějov. Esperantista Klubo, Merkrede, 20 h. en klubejo de Národní sdružení ĉe Moravská banka.

Přerov. Esperantista Societo! Ĉar nunjare ne-

niu havas tempon, ni kunvenas nur en monataj komitataj kunvenoj.

Trnava. „Ciril-Metodo“ Seminaria Esperanto-Rondeto, ĉiun duan Dimanĉon, 10 h. matene, en la seminario, strato Jána Hollého, 1.

Vyškov. Esperantista Rondeto, ĵaŭdon posttagmeze, (de oktobro ĝis majo) en lernejo Městanská škola.

Nové Zámky. Esperanta Rondo Amika, ĵaŭdon en urba popollernejo.

Ne plendu al iu alia, se via klubo ne troviĝas en la listo. Sed diru al la kluba sekretario, ke li sendu al ni la informon. Ni publikigas tion senpage, kun sola celo, servi al niaj membroj kaj al la vasta komunumo esperantista.

ĈESKOSLOVENSKÝ TISK A ESPERANTO.

Český deník Plzeň ze dne 22. ledna 1930 piŝe: „Žádost esperantských klubů a klubu členů strany nár. soc. ve věci přejmenování některých ulic v Plzni postoupena městskému museu a stavebnímu úřadu.“ Jak stojí ta věc nyní?

Pisecké listy a Prácheňské noviny měly v lednu několik zpráv o esperantu.

České Slovo v nedělní dětské příloze Slovičko přináší pravidelný kurs esperanta, řízený sl. Jul. Šupichovou. Upozorněte na tento kurs svoje známé, děti i dospělé!

Zájmy čl. pošt. a telegraf. zřízenectva Praha přináší v čísle z 1. ledna článek: V esperantu rozluštění (mluvícího filmu) — otisk z Lublaňského čas. Slovenec.

Kalendář čl. skautů (nakl. F. Stehlíka, Praha VII., Veletržní palác 4117, za Kč 6.50) obsahuje článek: Skauting a esperanto.

List říšského svazu čl. učitelek, Praha, přináší pravidelně rubriku o esperantském hnutí, řízenou sl. Jul. Šupichovou, odb. učít. v Praze.

Lidové Listy, Praha, otiskují v Esperantské rubrice dne 22. 2. několik zpráv o hnutí esp.

Čsl. Rodina, Praha, dne 14. II. přináší pod senačním titulem „Sličná tanečnice pronásledovaná Číňanem“, vypravování o tom, jak hezká tanečnice Etta Szaszová z Budapešti jedouc na esperantský sjezd v Oxfordu seznámila se ve vlaku s jakýmsi Číňanem, byla jím pak omámena éterem, ale podařilo se jí záchranou brzdou vlak zastavit a se osvobodit; byla pak ještě jednou přepadena v hotelu, ale jejím přátelům kongresovým, dvěma Japoncům, Američanovi a Polákovi, podařilo se jí znovu ochránit. Nečetli jsme nic podobného v esp. listech, a máme zato, že šifra —y nalezla starou historiku a lokalisovala ji do sféry esperantské.

MOVADO EN ĈEĤOSLOVAKIO

ROTARY.

Bratislava. En la ĉiutaga Rotary-klubo kiel invitita gastulo parolis pri esperanto dro Stan. Kamaryt la 16-an de januaro 1931. Post lia parolado sekvis diskuto ĝenerale aprobanta la ideon. La diskuton partoprenis rotary-anoj: Hofman, Kostlivý kaj vicprezidanto Lang.

Tisovec. Publika kurso por komencantoj komencis 5. I. 1931 en popola lernejo, daŭros 2 monatojn po 2 horoj semajne, paĝo 40 Kč por la tuta kurso, gvidas Josef Vitek, instruisto.

Orlová. Kunvenis 14. 12. 1930 en hotelo Hvězda 34 esp-istoj el 17 lokoj sub prezido de s-ro Krysta kaj decidis post raporto de s-ro Slanina fondon de „Regiona Esperantista Ligo“. Membra kotizo estas 6 Kč jare. La statuton preparos s-roj Krysta, Slanina, Liberda. Informojn donas s-ro Slanina en Třinec n-ro 188. (Ni volonte informas pri ĉiuj agadoj de esp-istoj, sed ni multe preferas povi raporti pri novaj kursoj, novaj uzoj, novaj publikaĵoj de esperanto, Rim. de Red.)

Orlová. Fonda kunveno de Regiona esperantista ligo okazis 25. I. 1931 en hotelo Hvězda. Estis elektitaj: I-a prez. Krysta, II-a prez. Ponča, komitatanoj: Balický, Hladký, Neděla, Petrák, Sebera, Skulina, Slanina, Slaný. Sidejo de la societo estas Český Těšín. La oficiala raporto de la fondintoj forgesis nomi la sekretariojn.

Radio Bratislava. Pluaj prelegoj en esperanto okazis 13. II., 28. IV., 21. V. 1930. Temoj de ĉiuj estis: Slovaka literaturo; prelegis s-ro E. Wanitsek. (Komparu paĝon 84.)

Vítkovice. Fonda kunveno de nova klubo okazis 23. 11. 1930. Partoprenis ĝin 13 personoj, (Gvidantoj s-roj Janečka, Slaný, Gadula.)

Prostějov. La 17. 12. 1930 estis en la klubo rememorigita naskiĝtago de Zamenhof per prelegoj „Zamenhof kiel edukisto“ (s-ro prof. Havránek) kaj „Signifo de esperanta literaturo por propagando“ (s-ro Heikenwälder).

Židlochovice. En ekspozicio „Kiel pasigi liberan tempon“ (19—31. XII. 1930) loka UEA-delegitino f-ino M. Chochořková aranĝis standon kun esp-a propaganda materialo, kies surskribo konsilis ĉeflingve: „En libera tempo lernu esperanto!“

Berehovo. Kurso de esperanto por sokolanoj estis malfermita la 17. 12. 1930.

ESPERANTO-BIBLIOTEKO EN LA NACIA MUZEO DE PRAHA.

Laŭ raportoj en ĵurnaloj de Praha S-ro Ed. Kühn l, oficisto de la ministerio de l'Ekstero en Praha, donacis al la Nacia Muzeo siajn librojn kaj gazetojn el la antaŭmilita tempo, dum kiu li aktive partoprenis la movadon esperantistan. La donaco devas resti nedividebla tuto kaj por dispono de seriozaj laborantoj. Ĝi konsistas laŭdire el 200 verkoj, 700 broŝuroj kaj 50 gazetoj. Eldonaĵoj esperantistaj de ĉefaj landoj formas memstaran kolekton. —

Piediranto tra la mondo esp-isto Ernest Maguire venis en Bratislavan 2-an de januaro 1931, vizitis tie esp-istojn, klubojn kaj redakciojn de ĵurnaloj Slovenský deník kaj Grenzboten. Li eliris el Perth en Okcidenta Aŭstralio la 4-an de aŭgusto 1927 por trairi piede Aŭstralion, Afrikon, Eŭropon, Azion kaj Amerikon. Li verkas pri la spertaĵoj kaj propagandas esperanton. El Bratislava li veturis Hungarion.

Honorigo. Nia prezidanto dr-o Stan. Kamaryt estis nomita koresponda membro de la Ŝafaříka akademio (Učená společnost Šafaříkova). Sinceran gratulon!

Grava atentigo al la samideanoj pagantaj kotizon por nia Asocio unuan fojon aŭ post ia paŭzo. Memoru, karaj kunlaborantoj, ke ni petante Vin, aliĝi al nia Asocio, ne konsilas al Vi eliĝi el UEA. Kontraŭe! Kontraŭe! Nepre restu en la sola organizacio por praktika uzo de esperanto! Eviti malkreskon de tiu ĉi korporacio estas la plej unua kaj la plej grava devo de tiu ĉi momento. Ni tre petas Vin: restu ĉiu, neniu perdiĝu! Kamaryt, prezidanto de ĈAE. R. Hromada, ĝen. sekref. de ĈAE.

Al la esperantistaj literaturistoj!

La sola pure literatura revuo de Esperantujo alvokas la atenton de ĉiuj literaturistoj esperantistoj je konkurso, aperinta er la unua numero de la revuo. La konkurso temas pri originala esperanto-romano laŭ la subaj kopdiĉoj:

1. La temo estas laŭplaĉa.
2. Amplekso: maksimume 300.000 litertipoj.
3. La verkon oni sendu sub pseŭdonimo ĉemetante la veran nomon en fermita koverto, signita per la pseŭdonimo.
4. Maŝinskribo aŭ tre klara manskribo, sur unu flanko de la papero, kun marĝeno, larĝa ĉ. trionon de la papero.

5. Limtempo: 30-a de aprilo 1931.

Juĝanta komitato: J. Baghy, K. Bodó, Jean Forge, K. Kalocsay kaj Raymond Schwartz.

Premio: 300.— t. e. tricent pengoj ĉ, 1700 Kč. Konkursante oni konsentas pri la senpaga publikigo en Literatura Mondo kaj pri la kulture honorariata eldono en libroformo.

Se la verkoj ne atingus certan nivelon, la komitato rezervas por si la rajton pri la eventuala nealjuĝo aŭ dispartigo de la premio.

La rezultoj estos publikataj en la julia numero de Literatura Mondo.

Konkursaĵojn adresu al

redakcio de Literatura Mondo,

Hungarujo, Budapest IX., Boráros tér 6. IV. : 11.

La X-a Internacia Tendaro de la Skolta Esperantista Ligo okazos 14—20. Julio 1931. apud Budapest, Hungarlando laŭ invito de la Hungara Skolta Ligo, kiu prizorgos por tiuj, kiuj anoncas sin plej malfrue en Majo, rabatojn sur fervojoj, ankaŭ de najbarlandoj. Bonvolu tion sciigi al la lokaj skoltaj ligoj kaj trupoj kaj instigi ilin, ke ili reprezentu sin simile, kiel okaze de aliaj internaciaj tendaroj. La reprezentantoj povas dum printempo lerni Esperanton; ili povas esti parte la samaj, kiuj partoprenos (— reprezentante vian landon) la Internacian kunvenon de Skolt-ĝvidantoj okazonta tuj poste en najbarlanda Vieno! En Hungarlando jam en pli ol 20 skolttrupoj, pli ol cent skoltoj studas Esperanton. Klopodu atingi similan sukceson en via loko kaj precipe zorgu, ke ni ricevu el via lando korespondantojn el skoltoj — eble komence esperantistoj tradukos la leterojn por ili, dum ili nur lernas —, nuntempe ne estas tiom da eksterlandaj skolt-korespondantoj por la hungaraj skoltoj, kiom ili konstante petas. Helpu la tujan praktikan utiligon de la lingvo per energia instigado! La Hungara Skolta Ligo publikigas en sia gazeto konstante niajn alvokojn kaj donos premion al la hungaraj trupoj, kiuj atingas la plej bonan progreson en lingvoscio kaj eksterlanda korespondo. Simila premio ekzistas por skoltaj skolt-trupoj. La Franda distrikto de Skolta E. Ligo, donas premion, kiu konsistas el senpaga veturo al la tendaro de Budapest! Klopodu similan fari en via regiono! Skribu bald aŭ al ni pri la sukcesoj, Kore dankas kaj salutas

Hungara Skolta Esperanto Rondo,
Budapest V., Nagy Sandor-utca 6.

Z ESPERANTSKÉHO SVĚTA

Red. O. Ginz.

Organisovaná světová propaganda

Ústřední esperantský výbor v Ženevě vyslal na cestu kolem světa svého delegáta, jehož hlavní úlohou bude informovat o otázce mezinárodního jazyka obyvatelstvo krajů, kde dosud nebylo organisované práce pro zavedení esperanta. Má též usnadnit systematickou činnost v jednotlivých zemích a umožnit ji i tam, kde dosud byli činní pro věc jen jednotlivci. Delegát Joseph R. Scherer vyplul na podzim 1930 ze St. Francisca na Havajské souostroví, odkud se odebere do Japonska. Na jaře r. 1931 jest očekáván v Evropě.

Zahraniční lázně upozorňují na sebe esperantisty.

Čelné evropské lázně vydávají v poslední době publikace v esperantském jazyku pro hosty, kterým byly jejich dosavadní tiskopisy v různých jazycích nepřístupny. Další výhodou esperantských tiskopisů jest možnost jejich rychlého rozšíření pomocí dokonalé organisace. Nákladnou esperantskou brožuru rozeslala v posledních dnech do celého světa lázeňská správa ve Wiesbadenu, byvši povzbuzena úspěchy jinde.

Jack London v Esperantu.

Nakladatelství mezinárodního svazu dělnických esperantistů vydalo mistrný překlad objemného díla Jacka Londona „Železný podpatek“. Jest to záslužný čin, který seznamuje čtenáře s cenným dílem Londonovým, které nejspíš pro svou tendenci bylo přeloženo dosud jen do několika jazyků.

Krátkovlnní radioamatéři žádají esperanto.

Ruští pracovníci v radiu, činící pokusy s krátkými vlnami vyhrazenými amatérům, jsou nespokojeni s dnešním stavem, kdy jest užíváno při mezinárodních vysíláních téměř výhradně angličtiny. Nejsou srozuměni s dosavadními telegrafickými značkami vytvořenými z anglických výrazů a právem ukazují na to, že jest nutno pomýšlet na zavedení snadného jednotného ja-

zyka především též pro pokusy radio-telefonické, které vyžadují dokonalé ovládnutí jazyka. Očekávají, že amatéři se dohodnou o užívání jasně znějícího esperanta, které nabývá v radiu stále více půdy.

Úřední odznak esperantský.

V několika státech zavedly úřady zvláštní označení pro své zaměstnance, ovládající esperanto, aby byli zřejmě patrní cizincům. Při loňské stockholmské výstavě nosilo přes 100 průvodčích na tamních tramvajích esperantský odznak, též někteří policisté. V Amsterdamě mají esperantskou hvězdu na rukávě i poštáči.

Bezruč v arabské učebnici esperanta. Právě vydaná učebnice esperanta pro Araby, sepsaná inž. Amin el-Moftí a tištěná v Kairu, obsahuje Bezručovu báseň Kovkop, přeloženou Red. Hromadou do esperanta.

Esperanto ve španělských školách. Španělský ministr vyučování ohlásil, že se ministerstvo hodlá zabývat myšlenkou zavést esperanto do některých škol. Ve své zprávě zdůraznil velkou výchovnou hodnotu mezinárodního jazyka a vyslovil naději, že ve Vysoké ústřední škole jazyků v Madridě bude snad již v krátké době možno konati pokusy s vyučováním esperanta. Zavedení do španělských universit považuje za předčasně.

Řecká mládež se zajímá o esperanto. Řecká vláda povolila zatím nepovinné vyučování esperanta od 5. třídy gymnasiální ve školách, kde jest vhodný učitel. Ve dvou gymnasiích v Pireu a Athénách se přihlásilo přes 1500 žáků. Po úspěšné zkoušce mají řečtí studenti právo nositi esperantský odznak — pěticípou zelenou hvězdu.

Gregg přítelem esperanta. Na slavnostním banketě společnosti New York Esperanto Society byl čestným hostem dr. John Robert Gregg, slavný vynálezce těsnopisné soustavy značně rozšířené v anglických zemích. Dr. Gregg mluvil o svých dojmech ze světového esperantského kongresu v Oxfordu, jehož se účastnil jako neinformovaný host. Byl přítomen všem sjezdom jednáním a odjížděl po ukončení kongresu s přesvědčením, že esperantem jest rozluštěn problém mezinárodního jazyka. Poznal jeho praktický význam i vliv na sblížení lidstva.

UNIVERSALA ESPERANTO - ASOCIO

SIDEJO : GENÈVE, SVISLANDO

Servaro : Bibliografia Servo — Eldona Servo — Ekspozicia Servo —
 Financa Servo — Gazetabona Servo — Informa Servo —
 Komerca Servo — Kongresa Servo — Libro-Servo — Re-
 klama Servo — Servo de Respondkuponoj — Oficperada
 Servo — Hotela Servo — Turisma Servo — Statistika
 Servo — Vojaĝa Servo.

Teritoria Oficejo por Ĉeĥoslovakio Hradec Králové 628-a.



LA DANGERO, KIUN NI VIDAS.

La unuaj monatoj de ĉiu administra jaro, dum kiuj la kotizpagantoj rajtas elekti premion por frua pago, estas ĉiam varmaj por la teritoria oficejo. Tiel estis nunjare dum Novembro, Decembro kaj Januaro, des pli, ĉar la kasista funkcio en ĈAE postulis ankaŭ sufiĉan laboron. Nu, la afero marŝis bone. Mia edzino laboris la tutajn tagojn kaj mi helpis vespere — pro banka bilanco mi venadis hejmen ĉiutage post la 18-a horo — kaj la sabataj posttagmezoj kaj dimanĉoj estis tre bone uzitaj tiel, ke ni havis ordon. La aliĝantoj estis rapide servitaj, plendoj ne estis. En plena fluo de afero ekmal-sanis la edzino. Inflamo de bronkoj kaj parta inflamo de pulmo, ankaŭ la pleŭmo estis tuŝita iomete. Dum pluraj semajnoj ŝi restis en lito kaj ĉiu laborado ĉesis. La aliĝoj, korespondadoj amasiĝadis kaj fine komencis venadi eĉ la plendleteroj. Kiam la malsano de la edzino feliĉe forpasis, ekmal-sanis la filo kaj fine ankaŭ la filino. Se tio ĉi ne tute malebligis la laboron, ĝi tamen malhelpas grave. Hodiaŭ estas la unua dimanĉo plene uzebla por niaj laboroj. Amaso da poŝtaĵoj kuŝas sur la tablo kaj atendas la respondon. Ni klopodas, sed ne sukcesas ĉion tuj fari. Niaj geamikoj havu la necesan paciencon. Ili komprenu kaj pardonu la prokraston.

La ĵus priskribitaj faktoj klare montras kiom la poresperanta laboro en nia lando estas ligata al la unuopaj personoj. Venas malsano kaj la maŝino ekhaltas. Tamen la homoj estas mortdevaj, dume nia afero devas funkcii daŭre kaj seninterrompe. Kion fari? Necesas, ke la respondecaj personoj bone mastrumadu niajn aferojn; necesas ĉiam kaj energie klarigi al esperantistoj de nia lando la absolutan neceson de aliĝo al la organizaj centroj. Multnombra, fidela membraro esperantista ebligis starigon de ĉeĥoslovakia Esperanto-Oficejo, en kiu laborus oficisto aŭ oficistoj salajrataj. Ankaŭ tiam estus necesa kunlaborado de la honorfunkciantoj, sed la ĉefa kaj plej necesa taga

laborado estos plenumata de salajrulo, ĉiam kaj rapide anstataŭebla per iu oficisto aŭ oficistino nova. Ni vivas en tempo, kiam la nombro de la administrataj esperantistoj jam superas la fortojn de homoj devantaj perlabori sian panon en alia okupo kaj nur en liberaj vesperaj horoj sinokupi je esperantaj aferoj — dume la kotizoj de la membraro ankoraŭ ne sufiĉas por dungi salajratan oficiston aŭ oficistinon. Nur granda oferemo kaj bona volo de ĉiuj ebligas transpaŝi tiun ĉi vere danĝeran periodon. Estus bone, se ĉiu esperantisto en nia lando havu tiujn ĉi faktojn antaŭ siaj okuloj.

Hradec Králové, 1. Marto 1931.

O. Sklenčka.

INTERNACIA LIBERTEMPEJO — PROVO DE NOVA SERVO DE UEA.

Pri ĝi legu nian artikolon en ĝeneva „Esperanto“ No 2. 1931 sur p. 28-12. Ni esperas kunveni en Lázně Bělohrad plurajn eksterlandajn samideanojn, kiuj emus pasigi kelkajn semajnojn en bela, senbrua, submontara, banloko malkare. Ĉiu esperantisto el nia lando, kiu venos dum julio-aŭgusto al Lázně Bělohrad, tute egale por kiom da tempo kaj en kiu tago, trovos tie vere internacian societeton esperantistan. Belaj ekskursoj tra la ĉarma ĉirkaŭaĵo nur pliinteresiĝos la restadon tie. — Informojn ni donos en tiu ĉi gazeto. — Povas esti, ke en la sama tempo okazos tie Ĉe-kurso. — Ne demandu nun, sed ĝisatendu la venontan numeron, en kiu ni jam donos pli detalajn informojn pri ĉio. Certe ne estas necese aparte akcenti la gravecon de tiu ĉi provo, kiu povas esti signifoplena por niaj aferoj, same kiel ĝi povas esti bonega propagando inter la neesperantistaj bangastoj en Lázně Bělohrad. Ĉiu el vi, kiu nur iomete povos, kalkulu, ke estas necese veni kaj helpi.

TRA LA MONDO ESPERANTISTA.

(Svedlando.) La estraro de Sveda Esperanto-Instituto kunvenis la 4. Jan. 1931 sub prezido de parlamentano E. Eriksson. La jar-raporto de la direkcio montras i. a., ke en la jaro 1930 ekzameniĝis 371 personoj en Svedlando. La eksterlandaj instruistoj gvidis kursojn por entute ĉ. 3.500 personoj.

(S. E. T.)

